



Universala Esperanto-Asocio

# Pri kelkaj problemoj de interlingvistiko

Intervjuo  
kun la franca lingvisto  
André Martinet

*Esperanto-dokumentoj* priskribas la laboron, organizon, kulturon kaj historion de la Esperanto-movado. Ili aperas unuavice en Esperanto kaj en la angla kaj franca lingvoj; laŭ la eblecoj aperos similaj serioj ankaŭ en aliaj lingvoj. La enhavo de la diversaj serioj ne estas identa. Ĉi tiu serio anstataŭas tiujn dokumentojn antaŭe eldonitajn de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED), kiuj pritraktis la Esperanto-movadon.

Reprodukto, ekstrakto aŭ traduko estas permesita, kondiĉe ke la fonto estu indikita.

La dokumentoj estas aboneblaj ĉe la landaj kotizperantoj de UEA aŭ rekte ĉe la eldonejo: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Abono validas ne por difinita periodo sed por fiksita nombro de dokumentoj. La abonprezo de 46 guldenoj ampleksas 10 dokumentojn en unu serio (Esperanta, franca aŭ angla).

La prezo de unuopa dokumento estas 4,80 guldenoj. Ekde tri ekzempleroj de sama dokumento unu ekzemplero kostas 3,20 guldenojn. Por grandaj kvantoj oni povas peti de UEA oferton pri aparte favora prezo. Al la prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 5 guldenoj) kaj por nederlandaj klientoj 6% por la enlanda imposto.

Redaktoro: Thomas Bormann

**PRI KELKAJ PROBLEMOJ DE INTERLINGVISTIKO:  
INTERVJUO KUN LA FRANCA LINGVISTO ANDRÉ MARTINET**

**Omaĝe al la 85-a datreveno de la naskiĝo de André Martinet**

**ENHAVO**

Enkonduko kaj Bibliografiaj notoj (François Lo Jacomo)	2
Intervjuo kun André Martinet (François Lo Jacomo, Detlev Blanke)	5
Notoj (Detlev Blanke)	18

## ENKONDUKO

La historion de lingvistiko, interalie en Francio, kaj de interlingvistiko, grave markis André Martinet, per verkaro de pli ol 20 libroj kaj pli ol 400 artikoloj, tradukitaj en dudekon da lingvoj (vidu bibliografian noton 7).

André Martinet naskiĝis en Savoja vilaĝo, la 12-an de aprilo 1908: “Kvankam mi ne estis proprasence dulingva, kiel mia patrino, mi vivis en mondo, kie ĉiu aĝo havis du nomojn” (9). Eble de tio fontis lia infana allogiĝo al lingvaj kaj fonologiaj konstatoj, al la observo de komunika informeco (*pertinence communicative*), kiu konkretiĝis post kontakto kun Otto Jespersen: preparante agregacion pri la angla lingvo, André Martinet tradukis en la francan (1928) lian verkon *Language*, kaj li samtempe interesiĝis pri interlingvistiko, anstataŭante Jespersen en kunsidoj de la naskiĝanta IALA (*International Auxiliary Language Association*, Internacia Helplingva Asocio).

En tiu tempo la franca lingvistiko koncentriĝis ĉirkaŭ la elstara filologo Antoine Meillet, kiu gvidis André Martinet al fonologia disertacio pri ĝermanaj lingvoj (1937). Sed la strukturismaj principoj de Ferdinand de Saussure ne sufiĉe enradikiĝis en Francio. Tial André Martinet, apogita de la Praga skolo (interalie de Roman Jakobson), fariĝis franca pioniro de tiu moderna lingvistiko: lia instruado markis tutan generacion de lingvistoj. Li precizigis sian sciencan vidpunkton kiel “funkciisman lingvistikon”, kaj lia famo, interalie kiel fonologo, disvastiĝis mondscale.

Plurajn jarojn li instruis en Usono (1946-1955): tiam li ankaŭ estis lingvistika direktoro de IALA, kaj li verkis plurajn kontribuojn al interlingvistiko (2,3). Sed li forlasis tiun asocion antaŭ ol ĝi, sub gvidado de Gode, eldonis la lingvoprojekton Interlingua, kaj de tiam li longe silentis pri la planlingva problemo: pro tio la jena intervjuo, kiun li konsentis en 1987, estas aparte grava. Nur trifoje en sia ĝisnuna historio la Internacia Kongreso de Lingvistoj aludis la planlingvan problemon, unuafoje en 1931 per raporto de Otto Jespersen (1), duafoje en 1949 per raporto de André Martinet (3), kaj triafoje en 1987 per podia diskuto iniciatita de Detlev Blanke (6).

Mi tute ne scias, pri kio temas lingvistiko, kiam en novembro 1974 mi unuafoje ĉeestis kurson de André Martinet: same kiel al Esperanto, al tiu kurso mi venis pro simpla scivolemo. Sed li rapide entuziasmigis min per sia honesta aliro al la lingva realaĵo, siaj bazaj principoj (interalie, ke “lingvo ŝanĝiĝas ĉar ĝi funkcias”). Li ne nur konsentis gvidi mian doktorigan disertacion (4) pri la evoluo de Esperanto (1977-1981), sed en 1978 li proponis min kiel sekretarion de la asocio SILF (*Société Internationale de Linguistique Fonctionnelle*, Internacia Societo de Funkciisma Lingvistiko), fondita iom antaŭe por doni al lia skolo la eblon plu vivi kaj libere esprimiĝi tra kolokvoj kaj publikaĵoj.

Post diskutoj kun Detlev Blanke, mi profitis la centjariĝon de Esperanto por peti de André Martinet intervjuon pri Esperanto: la 17-an de novembro 1987, li akceptis nin en sia hejmo kaj volonte respondis al niaj demandoj. La prilaboro de la intervjuo daŭris kelkajn jarojn, sed ĝi montriĝis fundamenta dokumento, klara prezento de la opinio pri Esperanto de unu el la plej elstaraj lingvistoj de nia jarcento; tial, post publikigo de la originala franclingva teksto (10), valoris traduki ĝin en aliajn lingvojn, interalie en Esperanton: tion faris Michel Duc Goninaz. Al André Martinet, kiu tre afable akceptis nin por tiu intervjuo kaj kunlaboris en la definitivigo de la teksto, kaj al ĉiuj, kiuj kontribuis en tiu ĉi publikaĵo, mi tre sincere dankas.

FRANÇOIS LO JACOMO

### BIBLIOGRAFIAJ NOTOJ

1. Jespersen, Otto. 1933. Report of Prof. O. Jespersen: First part (p. 94-96), Second part (p. 98-102), Réponses reçues (p. 77). En: *Actes du deuxième congrès international des linguistes, Genève, 25-29 août 1931*.
2. Martinet, André. 1946. La linguistique et les langues artificielles. En: *Word*, 2, n-ro 1, p. 37-47.
3. Martinet, André. 1949. Rapport préliminaire sur la possibilité et l'opportunité d'une langue auxiliaire internationale (p. 93-112), Rapport sur l'état des travaux relatifs à la constitution d'une langue internationale auxiliaire (p. 586-592). En: *Actes du sixième congrès international des linguistes*. Paris: Klincksieck.
4. Lo Jacomo, François. 1981. *Liberté ou autorité dans l'évolution de l'espéranto*. Doktoriga disertacio sub gvidado de André Martinet. Paris/Pisa: Edistudio.
5. Blanke, Detlev. 1985. *Internationale Plansprachen. Eine Einführung*. Berlin: Akademie-Verlag.
6. Blanke, Detlev, Sergej Kuznecov kaj Ronald Löttsch. 1990. Rundtisch/Round Table 13. Interlinguistik/Plansprachen. En: W. Bahner, J. Schildt kaj D. Viehweger (red.), *Proceedings of the Fourteenth International Congress of Linguists, Berlin/DDR, 10-15 August 1987*. Berlin: Akademie Verlag, p. 329-331.
7. Walter, Henriette kaj Gérard. 1988. *Bibliographie d'André Martinet et comptes rendus de ses oeuvres*. Louvain/Paris: Peeters. Bazaj verkoj de André Martinet estas: *Economie des changements phonétiques* (Berne, 1955) kaj *Eléments de linguistique générale* (Paris, 1960), ambaŭ tradukitaj en multajn lingvojn.

8. Martinet, André. 1989. The proof of the pudding... Introductory note. En: K. Schubert (red.), *Interlinguistics: Aspects of the Science of Planned Languages*. Berlin/New York: Mouton de Gruyter, p. 3-5.
9. Martinet, André. 1991. En droite ligne. En: H.-M. Gauger kaj W. Pöcki (red.), *Wege in der Sprachwissenschaft, 44 autobiographische Berichte*. Tübingen: Narr, p. 155-160.
10. Martinet, André. 1991. Sur quelques questions d'interlinguistique. Une interview de François Lo Jacomo et Detlev Blanke. En: *Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung*, 44, p. 675-687.

## INTERVJUO KUN ANDRÉ MARTINET de François Lo Jacomo kaj Detlev Blanke<sup>1</sup>

André Martinet, la jaron 1987, kiun markas la centjariĝo de Esperanto, markas ankaŭ la kvindeka datreveno de la defendo de via disertacio. Vi vaste kontribuis al tio, ke la lingvoscienco estu agnoskata en Francio kiel plenrajta universitata studobjekto, kaj via fameco ne limiĝis al Francio: vi efektive instruadis en Usono, kaj viaj verkoj, precipe *Elementoj de Ĝenerala Lingvoscienco* (1960) estis tradukitaj en ĉ. dek kvin lingvojn kaj estas uzataj en la tuta mondo por la inicado de la estontaj lingvistoj.

La strukturaj metodoj de la fonologia priskribo, instruitaj de la Praga Rondo, utilis kiel deirpunkto por via “funkciisma” aliro al la lingvaj faktoj: kiel defendanto de la “lingvistiko de la lingvoj”, vi rifuzas al vi la rajton redukti la lingvan realon profite al apriora teoria modelo; male vi klopodas eltiri el tiu realo ĉiujn elementojn efektive informajn en la ago de komunikado.

Ekde via infaneco vin tuŝis la problemo de la internacia helplingvo, al kiu vi plurfoje kontribuis: vi eĉ gvidis, post la dua mondmilito, la laboron de IALA<sup>2</sup> cele al la kreo de idiomu kiu pli bone ol Esperanto respondus al la postuloj de la internacia komunikado. Sed en 1949 vi forlasis tiun asocion, opiniante, ke ĝi ne disponas la necesan financon por akceli tian projekton.

Kiel membro de la Honora Komitato de la Centjara Jubileo de Esperanto, vi faris la 16-an de decembro 1986 en la sidejo de Unesko paroladon, en kiu vi precizigis vian propran sperton kaj vian vidpunkton pri Esperanto.<sup>3</sup> Por respondi pli komplete al la scivolo de multaj esperantistoj, bonvolu permesi al ni starigi kelkajn pliajn demandojn pri tiu temo:

*Ĉu viaj unuaj kontaktoj kun Ido,<sup>4</sup> devia versio de Esperanto, kaj pli ĝenerale via ekinteresiĝo por la problemo de la internacia helpa lingvo, influis vian lingvistan karieron? Pli ĝenerale, ĉu la intereso, kiun oni havas por Esperanto kaj la intereso por la naturaj lingvoj estas iel ligitaj? Se jes, kiel vi klarigas tiun lignon?*

**Martinet:** Sendube, mia kontakto, verdire tre supraĵa, kun Ido, estis tre grava por mia posta lingvosciencia pensado, ĉar ĝi ebligis al mi ekkonscii pri tio, ke la riĉaĵojn de iu lingvo ne kreas la morfologiaj komplikaĵoj. La franca lingvo nenion perdis, se, anstataŭ diri: *je vais, tu vas, nous allons, nous irons*, oni dirus: *j'alle, tu alles, nous allons, nous allerons*: tio estus pli simpla por ĉiuj. Konsekvence la kontakto kun lingvo kia Ido tuj konvinkis min, ke ekzistas io esenca en la lingvo: ĝia *strukturo* ĉu fonologia, ĉu gramatika – ne gravas tio –, kaj ke ĉiuj ĉi morfologiaj komplikaĵoj, truditaj de la tradicio, estas senutilaj kaj nur igas pli malfacila la komunikadon inter la homoj uzantaj la lingvon.

*Kion vi opinias pri la nuna situacio kaj la evoluaj tendencoj de la internacia lingva komunikado? Ĉu la ekzisto de kelkaj hegemoniaj lingvoj pludaŭros aŭ ŝanĝiĝos?*

**Martinet:** Nuntempe estas klare videble laŭ kiu direkto tio povus ŝanĝiĝi. Estas evidente, ke hodiaŭ la anglan lingvon puŝas favora vento. Dum la monda situacio estos tia, kia ĝi estas, mi opinias, ke la angla lingvo restos la lingvo, pri kiu pensas la homoj, tuj kiam ili planas internaciajn kontaktojn.

*Kaj kion vi opinias pri la angla-hispana dulingvismo, kiu ekestas en Usono?*

**Martinet:** La kazo de la hispana lingvo en Usono estas tre interesa, ĉar ĝi simptomas pri tio, kio estas Usono: nome, ĝi estas lando, kie la lingva imperiismo estas realaĵo, evidentaĵo, kaj ne vidpunkto. La usonanoj ne konscias, ke ili estas lingve imperiismaj: ili opinias simple, naive, ke la mondo esprimiĝas en la angla lingvo. Sed ekde la momento, kiam ili malkovras la ekziston de aliaj esprimrimedoj, kiujn ili ĉiutage renkontas, ili estas pretaj rekonsideri la problemon.

Kiam mi alvenis Novjorkon, neniu parolis lingvon alian ol la angla sur stratoj kiel la Kvinna Avenuo, en la centro de Manhatano. Oni ne povis aŭdi iun fremdan lingvon, krom la franca kelkfoje.

Ĉion ĉi ŝanĝis la portorikanoj: ili ja estas la nuraj usonanoj, kiuj ne adoptis laŭvole Usonon, kiuj ne klopodas asimiliĝi kiel eble plej rapide, kaj kiuj, konsekvence, parolas sian hispanan lingvon malkaŝe kaj publike. Tial en 1971, kiam mi pasigis la tutan printempon en Usono, la etoso estis tute alia ol tiu, kiun mi spertis en 1946: la hispana lingvo estis iĝinta unu el la du lingvoj oficiale akceptitaj. Tio pravas, ke ne ekzistas en Usono vere konscia imperiismo.

*Ĉu la estonteco de la lingvoj estas en la manoj de politikaj aŭ ekonomiaj potenciaĵoj, aŭ ĉu ĝi estas neniel kontrolebla? Ĉu la lingvistoj, kiuj interesiĝas, ekzemple, pri la lingvoj minacataj je formorto, povas iel interveni? Ĉu oni aŭskultos ilin pli volonte ol la esperantistojn?*

**Martinet:** La estonteco de iu lingvo dependas precipe de la rimedoj, kiujn oni disponas por ĝin defendi. Ni prenu la ekzemplon de la vaska lingvo, kiu fakte estas akiranta rolon de lingvo por ĝenerala komunikado. Mi partoprenis en septembro 1987 kongreson en San-Sebastiano, dum kiu la duono de la referaĵoj estis en la vaska lingvo. La ideo de tiu kongreso, orientita al lingvaj demandoj en la komenco, sed sekvita de aliaj kongresoj dediĉitaj al ĉiuj sciencaj fakoj, konsistis evidente en la demonstro, ke la vaska lingvo estas uzebla en ĉiuj cirkonstancoj de la vivo, ne nur en la ĉiutaga vivo, sed ankaŭ kiel scienca lingvo. Nu, la vaskoj havas nun registaron, kiu posedas la necesajn rimedojn por venkigi ilian ideologion.

*Konekse kun tio: la nura katalunia universitato, en kiu la kataluna lingvo ne estas instruata, estas la universitato de Perpinjano. Ĉu vi opinias, ke oni klopodu atingi, ke la kataluna estu instruata en Perpinjano?*



**Martinet:** Kompreneble, absolute!

*Ĉu la homoj, kiuj strebas por tiu instruado de la kataluna lingvo en Perpinjano disvolvas agadon esence malsimilan de tiuj, kiuj strebas por la instruado de Esperanto en iuj universitatoj?*

**Martinet:** Ne. Konsiderante, ke Esperanto estas lingvo parolata kaj uzata – eĉ se praktike ĝi estas uzata nur de dulingvanoj –, mi opinias, ke ĝi rajtas la samajn privilegiojn, kiajn oni donos al, ekzemple, la kataluna en Perpinjano. La ne-instruado de la kataluna lingvo en Perpinjano estas senkonscia ĉikanado kontraŭ tiu lingvo flanke de la francaj aŭtoritatoj. Tio validas ankaŭ por la vaska lingvo en franca Vaskio. Mi interesiĝas, ekzemple, pri la asocio Diwan en Bretonio, kiu klopodas revivigi la bretonan lingvon. Tiu klopodo estas senespera, sed tamen interesa, kaj mi persone apogas, laŭ la eblo de mia influo en tiu afero, la asocion Diwan.

*Ĉu ekzistas, laŭ via opinio, problemoj de la internacia komunikado?*

**Martinet:** Evidente ekzistas problemoj. Pri ĉio ekzistas problemoj, do ankaŭ pri la internacia komunikado, eĉ se nur tial, ke ĝi estas ege nesufiĉa kaj neperfekta.

*Ĉu do vi opinias, ke ekzistas solvo por tiu problemoj?*

**Martinet:** Vi probable opinias, ke Esperanto estas la solvo de tiu problemoj, sed eĉ se tia ideo estas konceptebla teorie, ĝin ne konfirmas la observo de la faktoj: nuntempe la angla lingvo tendencas esti la solvo, eĉ se veras, ke ĝi povas esti nur lama solvo, en tiu senco, ke ĝi donos plian povon al la homoj, kiuj kapablas ĝin uzi, kontraŭ tiuj, kiuj ĝin uzas malpli lerte. En 1932 mi pasigis unu jaron en Berlino, kaj, ĉirkaŭ la fino de mia restado, iu asocio de tre estimindaj homoj petis min porezenti mian opinion pri la internacia situacio. Mi rajtis elekti inter la germana kaj la angla lingvoj. En tiu epoko mi parolis germane tre flue, sed mi elektis la anglan, simple pro tio, ke mi pensis: “tiel mi troviĝos en egaleco kun mia publiko. Por ili, same kiel por mi, ĝi estas alia lingvo.”

*Ĉu la angla lingvo kaj Esperanto estas du pli-malpli perfektaj versioj de “la” solvo, aŭ ĉu ili fakte respondas al du malsamaj vidpunktoj pri la problemoj?*

**Martinet:** La avantaĝo de la solvo laŭ la tipo “Esperanto” estas la egaleco de la partoprenantoj. Eĉ se iu parolas Esperanton tre bone kaj alia malpli bone (la diferencoj inter “bone” kaj “ne bone” estas tamen malpli gravaj en Esperanto ol ili estus en kiu ajn nacia lingvo), ili havas la senton, ke ili estas en stato de egaleco, ĉar ĉiu el ili parolas ne sian unuan lingvon. Cetere tio malaperus ekde la momento, kiam Esperanto iĝus la unua lingvo de iuj personoj – kvankam ja ekzistas infanoj, kiuj lernis Esperanton kiel unuan lingvon . . .

*. . . eĉ plenkreskuloj . . .*

**Martinet:** Konsentite, sed necesus ekzameni, ĉu tiu unua lingvo bone konserviĝas. Dum mia lingvista sperto mi konstatis la malaperon de iuj unuaj

lingvoj: en Ameriko multegaj homoj, kiuj lernis la polan lingvon kiel unuan lingvon, ne plu kapablas ĝin paroli je la aĝo de dek jaroj.

*La jaro 1987 estas ankaŭ la mila datreveno de la kronado de Hugo Kapeto kaj, ĝis certa grado, la mila datreveno de Francio. Ĉu vi opinias, ke la konceptoj **lingvoj**, **nacio** kaj **ŝtato** estas nepre ligitaj, kaj kiun sencon vi donas al la esprimo **internacia lingvo**?*

**Martinet:** Jes ja, ili estas grandparte ligitaj. Eĉ en la tute aparta kaj favora kazo de Svislando, la deziron de la svisoj vivi kune, malgraŭ lingva diverseco, konstante ĝenas kultura misharmonio. Kaj vidu, kiel homoj reagis al la angla lingvo, emfazante inter la usona kaj la brita anglaj lingvoj malsamecon, laŭ mi arbitran: por praktikemulo kiel mi, tio similas aserton, ke en Marsejlo oni ne parolus la saman francan lingvon kiel en Parizo.

La esprimo “internacia lingvo” ne havas sencon, kaj estas preferinde ĝin ne uzi, ĉar ĝi estas ambigua. Influita de la terminologio de IALA, mi preferas diri “internacia helplingvo”.<sup>5</sup> Internacia lingvo estas ja nenio alia ol lingvo, kiun oni uzas en internaciaj kontaktoj. Ĝi povas esti kiu ajn lingvo: Esperanto, la germana, la angla, la rusa; kial ne la ĉe`a? Estas tute eble, ke ekzistas homoj, ne-ĉe`oj, kiuj finfine komunikas en la ĉe`a lingvo, ĉar ili opinias, ke la lingvo, kiun ili plej bone parolas, krom siaj naciaj lingvoj, estas la ĉe`a.

*Kion vi opinias pri la ideo de lingvo kreita konscie, por ke ĝi servu kiel ilo de komunikado pli demokrata?*

**Martinet:** Principe mi plene konsentas kun tio, kaj mi konas la argumentadon. Tuj ĉe mia unua kontakto kun lingvo tiucele kreita, mi ekkomprenis la aferon kiel demokratian idealon, celantan meti la homojn en staton de egaleco. Tamen tiun saman demokratian idealon mi perceptis unue en la angla lingvo: troviĝante en Germanio, kiel 13-jarulo lerninta la anglan lingvon en lerneja kadro dum du jaroj, mi uzis la anglan kiel kontaktlingvon kun multaj germanoj, kaj mi sentis en tiuj rilatoj anglalingvaj kun germanoj la avantaĝon esti en tiu egaleca stato, kiam oni uzas ne sian lingvon.

*Cetere, en Belgio iuj personoj sugestis la uzadon de la angla lingvo por solvi la lingvan problemon.*

**Martinet:** Efektive: en la flandringvaj regionoj la homoj tendencas uzi la anglan lingvon, eĉ kiam ili scipovas la francan. Kiam, en Zeebrugge, mi parolis france kun mia edzino, la ĉeestantaj ŝtatoĉefoj, kiuj, tute evidente, kapablis paroli france, alparolis nin en la angla lingvo, pro principo. Kaj pli kaj pli ekzistas belgoj, kiuj ne parolas france.

*Sed tiu ideo pri uzo de la angla lingvo en Belgio vekis protestojn en Kanado.*

**Martinet:** Por kompreni la reagojn de la flandroj en lingvaj aferoj, la francoj

devus kompari ilin kun la reagoj de kebekianoj: la nederlanda lingvo en Flandrio rolas kiel la franca en Kebekio.

*Por ektuŝi la celon de la nuna intervjuo: kion vi opinias pri Esperanto, tiu centjara lingvo? Kiel vi prijuĝas ties lingvajn specifaĵojn, ties eblaĵojn en komunikado, ties eventualajn perspektivojn?*

**Martinet:** Komence mi nur rediros tion, kion vi diris post Meillet: Esperanto estas io funkcia. <sup>6</sup> Estas rimarkinde ke idisto kiel Auerbach <sup>7</sup> povis deklari dum konversacio, kiun ni havis en Londono en 1947: “Mi, idisto, opinias, ke Esperanto funkcias, kaj ni ne certas, ke Ido funkcias, ĉar ni ne bonŝancis ĝin funkciigi”. Mi opinias, ke Ido, kiu malmulte diferencis de Esperanto, povintus probable funkcii kiel Esperanto. La diferencoj ege malpliigintus. Tial ke la ĉefa diferenco estas pli granda fleksebleco en Esperanto kompare kun Ido, tiu fleksebleco estus restariĝinta, se triumfintus la idista formo de Esperanto. La komunikadaj eblaĵoj de Esperanto estas evidentaj: finfine, lingvon faras ties uzantoj; do, se Esperanto estus universale adoptita, ĝi adaptiĝus al la bezonoj, kiujn ĝi celas servi.

Male, koncerne la perspektivojn, mi estas tre skeptika. Kiam mi, nome de IALA, provis kontakti respondeculojn de Unesko kun la ideo, ke eble pere de ili oni povus progresigi la aferon, mi tuj konstatis, ke fakte malantaŭ la afableco kaj la ĝentilaĵoj troviĝis la baro de tuj, kiuj pagas, subvencias Uneskon, unuavice Usono kaj Anglio. “Oni nenion povas fari kontraŭ la lingvo de la mondisonantoj.” Kaj la francoj, kiuj konsideris ankaŭ sian lingvon kiel internacian, reagis same. La baro de Unesko estas fakte la baro de la grandaj lingvoj, kaj tiu baro klarigas mian pesimismon.

*Pro tio ekzistas en la esperantista movado tiu reciproka opozicio inter du vidpunktoj: provi konvinki la decidantojn, kiel Uneskon, ke ili uzu tiun lingvon,<sup>8</sup> aŭ simple provi komprenigi al la ordinaraj homoj, ke Esperanto jam nun proponas konsiderindajn avantaĝojn.*

**Martinet:** Se la decidantoj fakte decidis ne ĝeni la potencon kaj la disvastigon de la naciaj lingvoj, la sekvida politiko konsistas, tute evidente, en la disvastigo de la lingvo ĉe aprobemuloj, por ampleksigi ĝian agadon. Kiel ajn estas, ĉar Esperanto suferas (eble escepte de la orientaj landoj) la oponon de la naciaj lingvoj, kiuj posedas la potencon, oni neeviteble frontos bremsadon, eĉ se ĝi ne estas eksplicita: oni ne faras kontraŭesperantan propagandon, sufiĉas nur favori la inercion.

*Detlev Blanke venas de Germana Demokratia Respubliko, kie Esperanto ĝuas relative privilegian statuson.<sup>9</sup> Ĉu vi opinias, ke tiu diferenco havas originon politikan aŭ lingvan?*

**Martinet:** Politikan, kompreneble! La orienteŭropaj landoj politike opozicias al Usono, tio estas al la nacio, kiu reprezentas la grandan forton de la angla

lingvo. La rusoj saĝe komprenas, ke tute ne eblas en la nuna tempo trudi la rusan lingvon sur tutmonda skalo. Do, estas tute normale, ke en orienta Eŭropo la homoj opinias, ke la disvastigo de Esperanto ne kontraŭas iliajn celojn. Mi estas cinikulo, en la angla senco de tiu vorto; tio signifas, ke mi ne kaŝas al mi la realaĵojn. Sed se tiu politiko favora al Esperanto sukcesos en la orient-eŭropaj landoj, ĉu la evoluo, laŭ mi dezirinda, kiu iel proksimigas orienton kaj okcidenton, favoros la plifortigon en okcidento de la ebloj de Esperanto aŭ, male, ilian malfortigon en oriento?

*Laŭ via opinio, kia devus esti la strukturo de lingvo konscie kreita?*

**Martinet:** Tio dependas de pluraj faktoroj: de tio, kion oni volas fari, de la publiko, pri kiu oni volas okupiĝi, de la maniero lanĉi la lingvon. Estas evidente, ke, se la lingvo estas destinita al la kelkaj miliardoj da homoj, necesas, por esti demokrata, esplori pli malproksimen ol oni faris ĝis nun.

Esperanto kaj aliaj lingvoj, kiuj povis esti konsiderataj kiel eventualaj konkurencantoj de Esperanto, estas lingvoj eŭropaj, laŭ la kultura senco de tiu ĉi vorto: oni volis preni la komunan denominatoron, se ne de la eŭropaj lingvoj, almenaŭ de la eŭropa kultura vortprovizo. Tio donas privilegion al la lingvoj latinidaj aŭ latintipaj, ĉar la latino estis konsiderata dum jarcentoj kiel la internacia lingvo de okcidento. Tio validas eĉ por Esperanto, malgraŭ la klopodoj de ĝia kreinto, kiu volis laŭeble liberigi de eŭropaj strukturoj, tio estas atingi lingvon – izolan aŭ aglutinan, ne gravas – strukture diferencan de la hindeŭropaj lingvoj de Eŭropo. Sed jam la ideo, ke oni devas aŭtomate kontrastigi la verbon, la substantivon, la adjektivon k.c. estas eŭropa nocio. La situacio estus tre malsama, se la lingvo estus kreita de japano. Tamen Esperanto, multe pli ol ties konkurencantoj, klopodis distanciĝi de eŭropaj strukturoj, sed malgraŭ tio ne vere liberigis sin de ili. Tio ĉio ne estas nepre malbona, pro la graveco de la eŭropa kulturo en la unuiĝado de la nuna mondo. Oni do povas diri bilance, ke Esperanto iris la ĝustan vojon.

*Kian gravecon vi donas al la lingva strukturo de iu lingvo rilate al ties ebla disvastigo?*

**Martinet:** La strukturo de lingvo estas io unuavica, kies gravecon kaj kompleksecon oni ne subtakso. Ekzemple, oni ne povas koncepti lingvon, en kiu ĉiuj signifohavaj unuoj estus, kiel teorie pretendite en Esperanto, senlime kombineblaj. Tiu ideo de Zamenhof – decidi, ke “ĉiuj monemoj estas egalrajtaj kaj aŭtomate kombineblaj” – estas sagaca, amuza, sed estas ja konjekteble, ke en la praktiko tio funkcias alimaniere. Necesas fidi al la funkciado de la lingvo: la strukturo de planlingvo ne limiĝas al la direktivoj komence difinitaj, ĉar finfine la lingvon faros ties uzantoj.

Tamen necesas scii, ke la disvastigo de iu lingvo apenaŭ dependas de ties lingvaj kvalitoj: el vidpunkto de la disvastigo Volapuko,<sup>10</sup> kun siaj egaj mankoj,

siaj malfacilaĵoj, povintus taŭgi. Mi, kiel lingvisto, tre adeptas al dinamismo; mi scias, kiom lingvo evoluas, ŝanĝiĝas, modifiĝas, adaptiĝas al la bezonoj de ĝiaj parolantoj: mi do ne povas kredi, ke ĉefan gravecon havas la lingvaj kvalitoj de la koncerna lingvo. Kio plej gravas, tio estas kompreneble la aŭtoritatoj kaj la potenco, kiuj estas malantaŭ la lingvo.

Se oni restas ĉe pure lingva vidpunkto, kio gravas, estas la unua impresoj, kiun kaŭzas la lingvo. Ĉar ĝi kapablos adaptiĝi al la bezonoj, la ĉefa afero estas, ke ĝi ne fortimigu, sed male, logu la homojn. Kompreneble, necesas eksplicitigi, kiajn personojn oni logu.

*Ĉu la demando pri la strukturo de ideala lingvo aŭ pri ebla plibonigo de Esperanto estas ankoraŭ aktuala?*

**Martinet:** Ne, kaj tio kuniĝas kun tio, kion mi jam diris: lingvo devas adaptiĝi. Certe, mi bedaŭras kelkajn karakterizaĵojn de Esperanto, kiuj estis aluditaj multe pli frue ol mi tion faris: la ĉapelitaj literoj, la finaĵoj *-aj, -oj* k.a., kiuj ne estas allogaj kaj fortimigas la homojn. La akordo de la adjektivo estas io absolute absurda! Estas tiaj detaloj, pri kiuj Zamenhof, iel senkonscie, konservis la komplikaĵojn, kiuj karakterizas iujn hindeŭropajn lingvojn je certa momento de ilia evoluo kaj kiuj, laŭ mi, estas bedaŭrindegaj: la ekzemplo de la angla lingvo montras al ni, kiom liberiĝas lingvo, forlasante la akordon de la adjektivo, kio akompanas la forlason de la distingo inter genroj.

Tamen, malgraŭ kelkaj provoj, kiuj kondukis al la kreo de Ido, la esperantistoj neniam volis reekzameni tiujn senutilajn komplikaĵojn. La blokado kontraŭ Ido rezultas de la jena timo: “Atentu, se ni komencas akcepti deviojn, malfermiĝas la pordoj por la senordo.” Mi opinias, ke tio estis eraro, ĉar lingvo uzata estas malferma: la diverĝo karakterizas lingvojn, kiuj ne estas uzataj; tuj kiam lingvo estas efektive uzata, establiĝas konverĝo.

*Ĉu vi opinias, ke la malamikeco de iu individuo kontraŭ Esperanto havas kiel motivojn raciajn argumentojn (ekz. pri la lingva strukturo) aŭ psikologiajn obstaklojn kontraŭ la ideo mem de la universala lingvo?*

**Martinet:** Tia malamikeco povas esti nur psikologia. Ĝi konsistas el rezisto kontraŭ la “artefarita” karaktero de la lingvo. Evidente tio ne validas por lingvistoj, kiuj tre bone scias, ke la lingvoj estas ege artefaritaj: oni fabrikas ilin, mi mem fabrikis vortojn en la franca lingvo. La hebrea, la nuna irlanda, la estona lingvo estis fabrikitaj, sed la publiko ne nepre estas informita pri tiuj faktoj, kaj ĝi sentas iaspecan malemon por io, kio ne estas “natura”.

Al tio aldoniĝas la sento, eble senkonscia, ke tiuj lingvoj povus anstataŭi kaj forigi la gepatran lingvon. Oni vidas en tio atakon kontraŭ la integreco de la individuo, kaj tio estas certe la ĉefa afero. Kiam vi diras: “angla”, “germana”, “hispana”, la homoj pensas: “Mi malfermas al mi pordojn al io ekzistanta”. Se vi diras: “Esperanto”, ili demandas sin: “Esperanto, por kio ĝi utilas?”

*Tio memorigas min pri la opinio de Emmanuel Companys, laŭ kiu, en la nuna epoko, la kono de la angla lingvo malfermas nenium pardonon, sed ĝia nekono fermas ĉiujn pordojn.*

**Martinet:** Tio ĉi estas tute ĝusta. Estas tute evidente, ke nun, en la nuntempa mondo, necesas unue lerni la anglan. Kontraŭ tio la esperantistoj povas nenion fari. Mi havas en tia okazo senton de senpoveco kontraŭ realaĵo, kaj la formulo de Emmanuel Companys estas tre amuza kaj tre ĝusta.

*Vi diris, ke la lingvistoj ne devus ŝoki la esprimon “artefarita lingvo”. Tamen ekzistas ja lingvistoj, por kiuj la fakto, ke Esperanto estas konstruita, ne deveninta de miljara kulturo, estas apriorie io ŝoka?*

**Martinet:** Ili ne estas lingvistoj, aŭ pli ĝuste: ili estas ŝokitaj ne kiel lingvistoj. Kiel informitaj lingvistoj, ili devus scii, ke Esperanto funkcias, kiel diris klare kaj eksplicite Meillet; konsekvence oni ne devus objeti kontraŭ ĝi. Nu tamen, estas inter la lingvistoj ĉiaspecaj homoj: se konsideri, ke filologoj estas lingvistoj, ili troviĝas en malbona pozicio por prijuĝi tiun problemon, ĉar tio, kio ilin interesas kiel filologojn, estas ĝuste ĉiuj komplikajoj, kiujn prezentas la naciaj lingvoj, malsame al lingvo kiel Esperanto. Estas nature, ke ili havas ian malamikecon kontraŭ lingvo, pri kiu la filologio havas nenion por diri.

*Ke Esperanto sukcesis pli bone ol aliaj projektoj de universala lingvo, ĉu tio ŝuldiĝas al la fakto, ke ĝi naskiĝis en favora momento, en 1887? aŭ ke ĝia lingva strukturo superas tiun de la konkurencaj projektoj? aŭ ke la esperantistoj starigas la problemon de la internacia komunikado laŭ maniero kontentiga por tiuj, kiuj sentas sin koncernataj de tiu problemo? aŭ ĉu ĉar ekzistas iu harmonieco inter la lingva strukturo de Esperanto kaj ties interna ideo?*

**Martinet:** En la momento, kiam aperis Esperanto, la konjunkturo estis favora. Sen ia ajn dubo, ĝia lingva strukturo estis supera al tiu de Volapuko. Sed se oni komparas Esperanton kun postaj projektoj, kiel Idiom Neutral,<sup>11</sup> necesas enkalkuli la lanĉadon de Esperanto: kiam tiuj projektoj aperis, Esperanto jam kaptis intereson, kaj havis la avantaĝon jam ekzisti. La kazo de Ido estas iel aparta, ĉar ĝi estas fakte reformita Esperanto, kiu konservis tion, kio estas bona, kaj klopodis elsarki ĉion, kio povus esti, ŝajne, plibonigita.

Koncerne la internan ideon, nu, evidente Esperanto estis kreita de homo difinita, en cirkonstancoj difinitaj, kun ideo difinita. Ja la ĝenerala plurlingvismo de Bjalistoko puŝis Zamenhofon al tia konceptado de sia lingvo. Se vi provas ekvidi, de kie originas la karakterizaĵoj de Esperanto, vi konstatas, ke la genitiv-adjektiva *-a* venas de la slavaj lingvoj. La akuzativo ne estus konservita, se la lingvo estus fabrikita de okcidentano, ĉar ĝi estas unu el la ĉefaj malfacilaĵoj por multaj: tiu okcidentano estus fidinta la kuntekston kaj la pozician interrilaton de la elementoj. La akuzativo estas grava malfacilaĵo por francoj lernantaj la germanan, kaj estas amuze konstati, ke en la germana lingvo la akuzativo estas

markita nur en unu kazo el ses: ĉe la singularo-virgenro. Ĝi ekzistas nek en la pluralo, nek ĉe la singularo-ingeno, nek ĉe la singularo-neŭtro, kaj tio montras, ke ĝi neniel utilas, ĉar oni ne povas fidi ĝin.

*Ĉu vi povus diri vian opinion pri la agado de IALA dum ties lasta fazo, kiam vi laboris en ĝi kiel lingva direktoro?*

**Martinet:** Mi opinias, ke tiu afero estas tre bone resumita en la libro de Detlev Blanke.<sup>12</sup> Mi diru pli precize, ke, kiam mi venis al IALA, ekzistis sufiĉe ampleksa teamo sub la direkto de Gode,<sup>13</sup> ĝi konsistis el germandevenaj lingvistoj, kiuj havis kiel principon, ke ekstrakti helplingvon kondukos al la ellaborado de iu latinida lingvo, de iu komuna latino de la kvina jarcento. Por doni sciencan karakteron al tiu agado, tiuj filologoj-latinidistoj klopodis retroiri en la pasintecon ĝis la momento, kiam oni povis trovi unu formon identan por la itala, la hispana, la portugala, la franca kaj la rumana lingvoj. Ilia ideo fakte konsistis en tio: detruu la francan-anglan hegemonion profite al la sudaj latinidaj lingvoj; ĉar tiuj, kiuj pli frue kreis lingvojn kiel Occidental,<sup>14</sup> Novial<sup>15</sup> k.a. pensis tro nature: “Se iu vorto ekzistas en la franca kaj en la angla, ĝi nepre estas bona kandidato.”

Kiam mi alvenis, mi ekstudis la problemon el iom malsama vidpunkto. La tradicia vidpunkto de la naturalistoj,<sup>16</sup> laŭ la linio de Edgar de Wahl, kreinto de Occidental, konsistis en tio, ke oni kombinu strukturon simplan kun maksimuma internacieco. Kion fari pri *rediger-rédaction*?<sup>17</sup> Jen la centraj problemoj, kiuj estis prilaborataj. Malmultaj homoj scias, ke en la momento, kiam mi ekŝiĝis, Gode estis tuj faronta la samon. Vidante mian foriron kiel eblon por triumfigi sian vidpunkton, li rezignis pri sia ekŝiĝo. Se mi estus ekŝiĝinta du monatojn poste, la situacio estus verŝajne komplete ŝanĝiĝinta.

La kialoj de mia ekŝiĝo estas bone klarigitaj. Mi estis interŝiĝinta pri IALA, ĉar mi kredis, ke malantaŭ tiu afero estas iu mona potenco, kaj ke per tre forta premo, postulanta gravajn rimedojn sur la eldona tereno, oni eble povos venki la publikan indiferentecon. Ekde la momento, kiam mi eksciis de la filo de s-ino Morris,<sup>18</sup> ke post malapero de tiu sinjorino, la afero daŭros maksimume unu jaron plu ĝis plena likvido, kaj sciante, ke la sanstato de s-ino Morris pli kaj pli malboniĝis, kaj ke ŝi malaperos senprokraste, mi ekpensis, ke daŭrigi ne valoras la penon. La mono, kiu ne venis rekte de s-ino Morris, venis de homoj, kiuj ŝatis “tiun simpatian Alican”: post ŝia malapero tiuj homoj absolute nenion farus.

*El lingva vidpunkto, kiel vi prijuĝas la sistemon Interlingua, kiun proponis Gode?*

**Martinet:** En tiu “naturalisma” direkto, mi preferas tre naturalisman naturalismon, kiel Latino sine flexione,<sup>19</sup> kun reguloj relative facile aplikeblaj, forigantaj la morfologiajn komplikajojn de la latino. Ĝi ne estas tre malsimila

laŭ la formo, kaj oni tuj ricevas normon uzeblan el ekzistantaj tekstoj. Ĉar en la mondo ankoraŭ ekzistas latinistoj, tio estis, en la tempo, kiam Peano proponis ĝin, interesa solvo.

*Ĉu vi sciis pri la lasta kongreso de Interlingua, kiu okazis en aŭgusto 1987, je kelkaj kilometroj de ĉi tie, en la Ecole Centrale de Châtenay-Malabry?*<sup>20</sup>

**Martinet:** Ne, mi tute ne sciis pri ĝi. Estas sciata, ke mi ne estas tre favora al tio. Mi ne opinias, ke ekzistis malamikeco inter Gode kaj mi, sed simple lia grupo estis tre aŭtonoma unuo. Kvankam mi estis “direktoro”, mi havis malmultajn proksimajn kunlaborantojn.

*Se vi estus informita pri tiu kongreso kaj povus liberiĝi je tiu dato, ĉu vi ĝin vizitus?*

**Martinet:** Estus interese por mi vidi, kiel stas tiuj homoj. Ili cetere provis apliki la disvastigan politikon, kiun mi mem sugestis, t.e.: demonstri, ke la lingvo estas tuj uzebla por recenzoj kaj por la diskonigo de skribaj verkoj. Ĝi estas lingvo, kiu evidente celis precize la skriban uzon, multe pli ol la parolan. Mi esperis, ke mi disponos multan monon por multon publikigi en la internacia lingvo de IALA:<sup>21</sup> multon, sed ne kion ajn kaj ne nepre beletron. Mi intencis publikigi precipe sciencajn artikolojn kaj havi la eblon diri al tiuj, kiuj uzas malgrandajn lingvojn, kiel la ĉe'a, la rumana k.s., ke ni estas je ilia dispono por traduki en la internacian lingvon la tekstojn, kiujn ili deziras publikigi.

*Fine mi eldiros kelkajn ideojn – kelkajn el ili mi mem redaktis, aliajn mi prenis el libroj, kiujn mi legis –, kaj mi demandas al vi, ĉu iuj el tiuj ideoj vekas vian reason.*

1. *“La inventantoj de lingvoj estas, laŭ iu aŭ alia maniero, kaj je diversaj niveloj de konscio kaj ekzaltiĝo, ribeluloj, kiuj elektis kiel celon de sia ribelo tiun tiranecon de la socia konvencio trudita de la sistemo de la lingvo, kiu kondiĉas la integriĝon mem al la grupo.”*<sup>22</sup>

**Martinet:** Ni estu klaraj. Kiel lingvisto mi dum mia tuta vivo inventis lingvojn. Ĉu temas pri la fonologia sistemo, ĉu pri la gramatiko, mi ĉiam amuziĝis per fabrikado de lingvoj, ĉar tio estas mia profesio kaj ĉar la lingvaj strukturoj interesas min. Sed mi estas evidente ia aparta kazo. Mi opinias, ke la esperantistaro varbiĝas precipe inter homoj, kiuj spertas ian nekontentecon kontraŭ la situacio de la mondo tia, kia ĝi estas.

2. *Esperanto allogas homojn, kiuj havas problemojn pri komunikado.*

**Martinet:** Ne nur pri komunikado; tio povas esti je pli intima nivelo. Oni povas senti sin interne trafita de la neceso por ĉiuj homoj interkompreniĝi. Oni povas havi pri la faktoj idealisman koncepton, kiu ne baziĝas sur lingvaj misoj aŭ konfliktoj. Mi opinias, ke ekzistas multegaj homoj, kiuj estas esperantistoj, kvankam ili ne sentis tiajn konfliktojn, kaj kiuj ankaŭ ne sentis urĝan bezonon pri kontaktolingvo.



3. Kiel ĉiu lingvo, Esperanto evoluas, ĉar ĝi funkcias, kaj eĉ la reguloj formulitaj de la kreinto aŭ registritaj en lernolibro ne povus malhelpi tiun evoluadon.

**Martinet:** Sendube, kiel brile demonstris François Lo Jacomo.<sup>23</sup> Sed tio estas evidenta. Eĉ antaŭ tridek jaroj mi tion sciis.

*Ne ĉiuj esperantistoj konsentas pri tiu ĉi punkto.*

**Martinet:** Ili estas naivuloj.

4. “La funkcio, kiu oni povus atendi de internacia artefarita lingvo, estas nuntempe fakte plenumata de la usona angla lingvo.”<sup>24</sup>

**Martinet:** Ne, ĉar oni povis atendi de artefarita lingvo, ke ĝi liveru egalecon inter partoprenantoj, kaj tia egaleco ne estas garantiata de la usona angla lingvo. Tamen la angla lingvo ne estas problemo por mi, kaj mi malpli emas lerni kaj praktiki lingvon kiel Esperanton, ĉar praktike mi parolas la anglan same kiel la francan. Cetere, la esprimo “usona angla” ŝajnas al mi neĝusta: temas pri la angla, tutsimple.

*Sed iuj lingvistoj – ne nepre lingvistoj favoraj al Esperanto – opinias, ke tiun rolon ekplenumis ne la literatura angla, sed relative artefarita formo de la angla, kiun ili nomas la usona angla lingvo.*

**Martinet:** Ne, mi ne konsentas. La lingvo, kiu trudiĝas, estas speco de angla lingvo, de bona angla lingvo, kiu havas variaĵojn. En aviado, ĝenerale regas la usona, en la plejparto de la aliaj cirkonstancoj restas favorata la brita angla. Eĉ en Japanio, ekzemple, la brita angla estas tute plenrajta, kio estas stranga, kiam oni konstatas la direkton de la evoluo.

5. *Eĉ se ne ĉiuj bezonas Esperanton, la fakto, ke iuj personoj, kiom ajn ili estas, trovas en ĝi iaspecan kontentiĝon, sufiĉas por pravigi ĝian ekziston.*

**Martinet:** Absolute ĝuste. Estas tute klare, ke la malaperado de Esperanto estus laŭ mia opinio perdo por la homoj, kiuj ĝin uzas, sed ankaŭ por la civilizo ĝenerale. Tiu kombino de lingva fakto kun fakto psikologia – en tre vasta senco de tiu ĉi vorto – estas interesplena elemento de la nuna mondo, kaj estus bedaŭrinde se tio malaperus.

6. *La rajto je komunikado estas nepre ligita kun la rajto je diferenco.*

**Martinet:** Bele dirite. Sed la avantaĝo de la lingvoj konsistas en tio, ke ilia praktikado rezultigas konverĝon: kiam ekzistas kontakto, ne estas diverĝo. Mi citos la interesan ekzemplon de la fervoja terminologio. La fervojo, naskiĝinta en Anglio, disvolviĝis senlige en Anglio kaj en Usono, kaj la tuta terminologio malsamas: *bileto tien-reen, fervojo, ŝpalo, lokomotivo* ktp, ĉar en tiu epoko ne ekzistis kontaktoj. Kun la aviado tiu fenomeno finiĝis: la terminologio estas plene internacia; ekzistas kontaktoj kaj do necesas paroli la saman lingvon.

*Detlev Blanke rimarkigas, ke jam nun observiĝas inter la germana lingvo*

*parolata en Germana Demokratia Respubliko kaj la germana parolata en Federacia Germanio diferencoj, ŝuldataj al la manko de kontaktoj.*<sup>25</sup>

**Martinet:** Jes, certe. Oni povis tion atendi. Sed estus interese disponi pri detala studo de tiu problemo. Ĉu ekzemple tio koncernas iujn gramatikaĵojn?

*7. Por vere komuniki, ne sufiĉas paroli la saman lingvon.*

**Martinet:** Jes ja, tamen tio tre faciligas la aferojn. Estas vere, ke por bone interkompreniĝi, necesas atribui al la vortoj de la lingvo la saman sencon, kaj estas evidente, ke franc-, german- aŭ angle-parolantoj ne atribuas la saman valoron al la samaj vortoj. Por komuniki, necesas komuna bazo. Sed tiu komuna bazo akiriĝas ĝuste per la praktikado de iu lingvo. Ĉu vi ne havas la impreson, ke la praktikado de Esperanto kreas jam nun, kvankam ne ekzistas esperantista nacio, ian komunan bazon, kiu faciligas la kontaktojn krom la simpla uzado de la sama lingvo? Tamen veras ankaŭ, ke iu vorto estas ĉiam markita de la cirkonstancoj, en kiuj vi ĝin lernis en via denaska lingvo.

*8. La misscioj pri Esperanto kredigas, ke ĝi estas io danĝera. Male, se oni jam studis Esperanton, oni scias, ke la esperantistoj havas humanecajn ideojn, kiuj, en la nunaj cirkonstancoj, ne vere endanĝerigas la ŝtatojn.*

**Martinet:** Sed Esperanto endanĝerigas la sakraligon kaj la tutpotencon de la ŝtato! Oni ne devas miri, se en iu faŝista tendaro oni malamikas al Esperanto.<sup>26</sup>

*Esperanto – hieraŭa revo, hodiaŭa lingvo, morgaŭa perspektivo: ĉu eblas interesiĝi pri Esperanto sendepende de ĝiaj pasinteco kaj estonteco? Kiun sencon oni povas doni al la aserto: “Esperanto fiaskis”?*

**Martinet:** Hieraŭa revo? Jes. Hodiaŭa lingvo? Jes. Morgaŭa perspektivo? Kial ne? Oni ja povas interesiĝi pri Esperanto sendepende de ĝiaj pasinteco kaj estonteco: lingvisto povas ĝin pristudi kiel ne-dinamikan realaĵon, kvankam mi persone sentus la bezonon observi, kia ĝi iĝas kaj kia ĝi jam iĝis.

Kiun sencon doni al la aserto “Esperanto fiaskis”? Pli ĝuste, ĝi sukcesis, sed kun nepra limigo. Laŭ la vidpunkto de la komuna opinio, Esperanto estas markita kiel io speciala, kio devas kontentigi iun deziron. Nu, tiu deziro ne estas plene kontentigita. Ĉu la sento, kiun ni spertas en la nuna mondo, ke la landlimoj perdis gravecon, ne povas logi homojn al interesiĝo pri Esperanto pli vaste ol antaŭe? Tamen, tiu evoluo estas ligita kun la samtempa establiĝo de unu nacia lingvo – la angla – kiel lingvo internacia. Ni senĉese retrovas la saman problemon. Tamen Esperanto ne fiaskis: kompare kun ĉiuj aliaj internaciaj helplingvoj, ĝi sukcesis.

*Kion vi opinias pri la ideo, ke Universala Esperanto-Asocio kandidatiĝu por la Nobel-premio pri paco?*

**Martinet:** Kompreneble! Tio ŝajnas al mi tute konvena.

*Ĉu vi mem pretus proponi Universalan Esperanto-Asocion kiel kandidaton por la Nobel-premio pri paco?*

**Martinet:** Jes, kompreneble! Estas pli ol klare, ke la universala alpreno de Esperanto kiel internacia lingvo implicus pacon en la mondo. Ĝuste tio estas obstaklo por Esperanto: ankoraŭ ne venis la tempo, kiam la homoj akceptus la mondan pacon.

*Ĉu la revo de la esperantistoj same utopias, kiel la revo de la pacifistoj?*

**Martinet:** Tio ja iel similas. Mi persone neniam renkontis esperantiston, kiu ne estus preta al ĉiaj oferoj, el nacia vidpunkto, por atingi la pacon.

*Ĉu vi opinias, ke oni povas defendi la ideon de Esperanto same arde, kiel la ideon de la monda paco, aŭ ĉu vi vidas diferencon?*

**Martinet:** La diferenco laŭ mi ne estas granda. Kompreneble la konservo de la paco en la mondo estas io multe pli grava, kio do interesas multe pli da homoj ol la disvastigo de Esperanto, sed ambaŭ aferoj estas ligitaj kaj iras al la sama direkto.

*Ni dankas vin.*

## NOTOJ

1. La intervjuo estis farita la 17-an de novembro 1987 en la siatempa loĝejo de André Martinet, en Sceaux, Francio. La demandojn, ellaboritajn de François Lo Jacomo kaj Detlev Blanke, dum la intervjuo resume starigis Lo Jacomo, kiu, depende de la paso de la intervjuo, modifis kaj detaligis ilin.
2. *International Auxiliary Language Association* (IALA, 1924-1953) havis la celon sciencigigi la problemaron de internacia lingvo. Kp. Blanke, *Internationale Plansprachen*. Berlin: Akademie-Verlag, 1985, p. 167-183.
3. Intervention de A. Martinet. En *Revue française d'espéranto* 5/1988 (379), p. 62-64.
4. Ido estas planlingva sistemo bazita sur reformoj de Esperanto kaj publikigita en la jaro 1907 de Louis Couturat kaj Louis de Beaufront. Kp. Blanke, *Internationale Plansprachen*, p. 183-201; E. Drezen, *Historio de la mondolingvo* (4-a eld., red. S. Kuznecov), Moskvo: Progreso, 1991, p. 278-288.
5. Pri la parte konfuzanta terminologio kp. Blanke, The Term "Planned Language". En *Language Problems & Language Planning* 11(1987)3, p. 335-349.
6. "Ĉiu teoria diskuto estas vana: Esperanto funkcias." Antoine Meillet, *Les langues dans l'Europe nouvelle*. Paris, 1928, p. 278.
7. Siegfried Auerbach i.a. eldonis *Wörterbuch Deutsch-Ido* (Leipzig: Ido-Editerio, 1922, 188 p.). Pri la interlingvistika agado de Auerbach informas A. Matejka en la Interlingue-revuo *Cosmoglotta*, 50(1971), n-ro 263, p. 27-29.
8. Prepare al la centjariĝo de Esperanto (1987), tamen Unesko akceptis en 1985 la rezolucion 23 C/ Res.11.11., aprezante en ĝi i.a. "la grandajn eblojn, kiujn Esperanto prezentas por la internacia kompreniĝo kaj la komunikado inter popoloj de malsamaj naciecoj".
9. De 1965 ĝis 1990 la adeptoj de Esperanto en GDR estis organizitaj en Esperanto-Asocio de Kulturligo de GDR. Pri ilia agado kp. Blanke, Skizo de la historio de GDREA. En *der esperantist* 26(1990)6 (164), p. 121-137.
10. *Volapük* (*vol* = mondo, *pük* = lingvo): fine de la 19-a jarcento relative konata planlingvo, publikigita en 1879 de Johann Martin Schleyer. Kp. Blanke, *Internationale Plansprachen*, p. 202-218; Drezen, *Historio de la mondolingvo*, p. 167-182.
11. *Idiom Neutral*: planlingvo, publikigita en 1898 de Woldemar Rosenberger. Kp. Woldemar Rosenberger, *Wörterbuch der Neutralsprache* [Idiom Neutral], *Neutral-Deutsch und Deutsch-Neutral*. Leipzig: E. Haberland, 1902, 320 p.
12. Martinet celas la cititan libron *Internationale Plansprache* de Blanke (p. 167-183).

13. La romanisto Alexander Gode de 1943 ĝis 1946 kaj de 1948 ĝis 1953 estis lingvistika direktoro de IALA kaj estas rigardata aŭtoro de Interlingua, planlingvo publikigita en 1951. Kp. Blanke, *Internationale Plansprachen*, p. 174-184.
14. La planlingvo Occidental estis publikigita en 1922 de Edgar de Wahl kaj ricevis en 1947 la novan nomon Interlingue (ne miksu kun Interlingua!). Kp. Blanke, *Internationale Plansprachen*, p. 161-167; Drezen, *Historio de la mondolingvo*, p. 311-313.
15. *Novial* (= *Nov International Auxiliari Lingue*) estis publikigita de Otto Jespersen. Kp. Jespersen, *Eine internationale Sprache*, Heidelberg: Winter 1928, 148 p. (angle: *An International Language*, London: Allen & Unwin, 1928).
16. Naturalistoj en la interlingvistika terminologio estas adeptoj de la opinio, ke planlingvo kiom eble plej similu al difinita lingvo-familio (ĝenerale temas pri la latinida), por ke ĝi aspektu kiom eble plej “nature”. Adeptoj de Esperanto kaj Ido apartenas al la “aŭtonoma” aŭ “skema” interlingvistika skolo, akcentanta pli forte funkciajn aspektojn kaj malpli forte “naturajn”.
17. La francaj vortoj *rédiger* (= redakti) kaj *rédaction* (= redakto) ekzemplas la oftan kazon kiam, por plia internacieco, naturalismaj lingvoprojektoj rezignas formi similsignifajn vortojn el sama radiko.
18. S-ino Alice V. Morris estis la mecenato de IALA.
19. *Latino sine flexione*: planlingvo publikigita en 1900 de Giuseppe Peano. Kp. Blanke, *Internationale Plansprachen*, p. 143-145.
20. Union Mundial pro Interlingua (UMI) havas tutmonde inter 200 kaj 300 adeptojn kaj okazigas ĉiun duan jaron internacian renkontiĝon partoprenatan de ĉ. 30-40 personoj. La lasta (t.e. la 10-a) okazis en 1991 en la sveda urbo Helsingborg.
21. Temas pri Interlingua, rigardata kreaĵo pli de Gode ol de IALA.
22. Tiu frazo devenas de la franca lingvisto Claude Hagège.
23. François Lo Jacomo en 1981 defendis ĉe A. Martinet sian doktorigan disertacion (*thèse pour le doctorat de troisième cycle*) kun la titolo *Liberté ou autorité dans l'évolution de l'espéranto* (384 p.).
24. Claude Hagège en *L'homme de paroles*.
25. Tio estas miskompreno. Temas pri diferencoj en la leksiko, pli ŝuldataj al reflektado de malsamsistemaj sociaj evoluoj ol al mankantaj kontaktoj.
26. La adeptoj de Esperanto ja suferis multajn persekutojn inkluzive fizikan likvidon. Kp. Ulrich Lins, *La danĝera lingvo: Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto*. Gerlingen: Bleicher, 1988, 546 p.; 2-a eldono Moskvo: Progreso 1990, 568 p.

DETLEV BLANKE



## Listo de la Esperanto-Dokumentoj

<b>N-ro</b>	<b>Titolo</b>
1.	Unesko kaj UEA, 1954-1974 (elĉerpita)
2.	La kontribuo de Universala Esperanto-Asocico al la monda paco (elĉerpita)
3.	Esperanto tra la etero, 1922-1975 (elĉerpita)
4.	Enkonduko al Esperanto-studoj (elĉerpita)
5.	Universala Esperanto-Asocico en la Internacia Jaro de la Virino 1975 (elĉerpita)
6.	Internacia turismo de la parolantoj de Esperanto (elĉerpita)
7.	Lingvaj problemoj kaj la Fina Akto (elĉerpita)
8.	La lingva problemo en la Eŭropa Komunumaro (elĉerpita)
9.	Esperanto kaj la pliaĝuloj (elĉerpita)
10.	Esperanto: Ĉu eŭropa aŭ azia lingvo? (elĉerpita)
11.	La Lingvo kaj la rajto je komunikado (elĉerpita)
12.	La uzado de la internacia lingvo Esperanto kiel parta solvo de la lingvoproblemoj en internaciaj neregistaraj organizoj: kelkaj rekomendoj (elĉerpita)
13.	La lingva problemo de la movado de nealiancitaj landoj
14.	Rezolucioj de la 65a Universala Kongreso de Esperanto
15.	Ses esplorcentroj pri interlingvoj
16.	La oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo
17.	Generaciaj aspektoj de la Esperanto-movado. Raporto pri la 67a Universala Kongreso de Esperanto, 1982.
18.	Lingvaj malhelpoj en rilato al la nova monda informa kaj komunika ordo
19.	Monda Komunika Jaro: Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado
20.	La oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo (2a eld.)
21.	Historio de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
22.	La lingva problemo en turismo
23.	La soci-politika, pedagogia kaj kultura valoroj de Esperanto
24.	La lingva problemo en scienco kaj la rolo de la internacia lingvo
25.	Esperanto – lingvo de la natursciencoj kaj tekniko
26.	Psikologiaj reagoj al Esperanto
27.	Al unu lingvo por Eŭropo? La estonteco de la eŭropa Babelo
28-29.	Al nova internacia lingvopolitiko: La propedeŭtika valoro de Esperanto
30.	Perkomputila tradukado: La revo kaj la realo

*Pluraj el la ĉi-supre menciitaj broŝuroj haveblas ankaŭ en la franca kaj angla lingvoj.*

# FONDOŜTONOJ POR LA DUA JARCENTO

*En la Jubilea Kolekto de UEA aperis:*

## **Esperanta antologio**

Trezorminejo el pli ol 700 poemoj de 163 aŭtoroj.  
Redaktis William Auld. 888p. 60,00 gld.

## **Plena analiza gramatiko**

Profunda studo pri la internaj reguloj de Esperanto.  
Kálmán Kalocsay, Gaston Waringhien. 598p. 48,00 gld.

## **Lingvo kaj vivo**

Eleganta esearo pri la naskiĝo kaj evoluo de Esperanto.  
Gaston Waringhien. 452p. 48,00 gld.

## **Trezoro: La Esperanta novelarto**

Riĉa sortimento de pli ol 150 prozaĵoj de 100 aŭtoroj.  
Redaktis Reto Rossetti, Henri Vatré. Eldonis HEA. 948p.  
69,00 gld.

## **Nova Esperanta krestomatio**

Teme kaj lingve moderna trarigardo de nia lingvotradicio,  
redaktita de William Auld. 510p. 57,00 gld.

## **Fundamenta krestomatio**

La klasika stilmodelo redaktita de Zamenhof, kun novaj  
lingvaj notoj de Gaston Waringhien. 464p. 48,00 gld.

*Mendu ĉe la Libroservo de UEA!*